

# INFORMA

BOLLETTINO D'INFORMAZIONE

# BULTENO



**Bolonja Esperanto Grupo**  
**Gruppo Esperantista Bolognese**  
**"Achille Tellini 1912"**

**Via Avesella 16 - 40121 Bologna**  
**tel-fax: 0516446675**

**gesperbo@iperbole.bologna.it**  
**www.comune.bologna.it / iperbole / gesperbo**  
c.c.p. n°18231407

**Jaro / Anno 61 – n. 2**  
**Junio / Giugno 2011**

Redaktoro - redattore  
Mario Amadei

## **JAPANIO KAJ JAPANAJ ESPERANTISTOJ VENKOS LA KATASTROFON.**

**Kun dankemo pro viaj kondolencoj kaj kuraĝigo.**

### **Tertremo kaj cunamo.**

Kiam okazis la 11an de marto 2011 je la 14-a horo kaj 45 minutoj, mi estis en la najbara pŝtofiĉejo, 300 kilometrojn fore de la epicentro. Subite venis grandaj kaj malrapidaj tremoj, kvazaŭ mi estus sur granda ondo. Ĝi daŭris longe. Ni kutimas sperti ordinarajn tertremojn, sed tiu tremado estis tute alia. "Ie okazis grandega tertremo!"

Tio estis mia unua opinio. Mi hastis hejmen. Pupoj sur la breto falis plankon, sed bonŝance nenie estis io nenormala. Sed jam en televido aperis teruraj bildoj de cunamo. Grandega cunamo supreniris la riveron kaj englutis belajn kampojn kaj la flughavenon. Ĝi facile ŝovis domojn, grandajn ŝipojn kaj aŭtomobilojn supren, kaj tuj post la kulmino la ondo revenis al la maro, kunprenante ĉiujn kune. Sekvis en televido teruraj bildoj post bildoj en aliaj lokoj. Vere katastrofo!

Tiun longan marbordon laŭ Pacifika Oceano antaŭe atakis cunamo trifoje post la japana modernigo en 1868, tial oni "bone" preparis sin kontraŭ la eventuala cunamo, konstruante grandegajn kontraŭcunamajn digojn, kaj trejnigis sin pri la evakuado, sed tiu ĉi tertremo superis ĉiujn antaŭsupozojn. La ondego facile transiris la 10-metrajn digojn kaj englutis eĉ rifuĝejojn garantitajn kiel sekurajn. En iuj havenoj okazis fajrego pro benzino el la ŝipoj, kiu bruligis domojn kaj ŝipojn. Poste restis nur montoj da detruaĵoj. Tiu pejzaĝo similis al tiu de Hiroŝima kaj Nagasaki post la eksplodintaj atombomboj en 1945.

### **Akcidento de la nukleaj centraloj.**

En la gubernio Hiroŝima estas nukleaj centraloj, n-ro 1 kun kvar reaktoroj kaj n-ro 2 kun du, apartenantoj al la Elektro-Kompanio Tokio. Multaj jam proponis al la kompanio plibonigon de la kontraŭcunama rimedo, sed tiu ĉiam ignoris la proponojn, insistante pri la sekureco de la centraloj. Tamen tiu cunamo estis multe pli granda ol ĝia antaŭsupozo, kaj detruis la malvarmigan sistemon de la nukleaj brulaĵstangojn en kaj ester la reaktoroj. Pro tio la reaktoroj fariĝas varmegaj kaj ekestis hidrogena gaso, kiu eksplodigis la kovrilajn domojn. La belaj konstruaĵoj de la reaktoroj fariĝis skeletaj. Oni vivriske pumpis grandan kvanton da marakvo en la konstruaĵojn, sed ankaŭ nun oni ne sukcesis kvietigi la reaktorojn, male granda kvanto da radioaktiveco eliĝis kaj malpurigis la ĉirkaŭaĵon kaj la maro. La registaro ordonis al la loĝantoj en la radiuso de 20 kilometroj evakuiĝi, kaj rekomendis al tiuj en la radiusoj de 20-30 kilometroj resti hejme. En tiuj zonoj troviĝas kelkaj

urboj, kiuj devis transloki sian urban funkcion al alia urbo, kunprenante plejparton de la loĝantoj.

Kvin grandaj landoj rilate al la nombro de nukleaj reaktoroj estas Usono (102), Francio (59), Japanio (54), Rusio (29) kaj Germanio (27). La nombro 54 de Japanio estas eksterordinara. Ĝi ja estas malgranda lando kun multaj loĝantoj. La lando estas montara kaj vulkana kun oftaj erupcioj, tertremoj kaj cunamoj. Estas stultege konstrui tiom multe da reaktoroj en tia lando, tamen la ĝisnunaj regantaj partioj (eble duone sub la trudo de Usono) antaŭenpuŝis la konstradon, insistante aŭ mensogante pri sekureco de la nukleaj centraloj. Nun la trompita kaj bonkora japana popolo devas akcepti la frukton de ilia monavideco kaj sia naiveco.

### **Radioaktiveco disvastiĝas.**

Radioaktiveco el la reaktoroj disvastiĝis kaj eĉ en Tokio oni trovis la akvon malpurigita pli la normo por beboj, do homoj panike aĉetis botelojn da akvo. Oni detektis radioaktivecon en spinaco kaj aliaj legomoj, produktitaj en kelkaj gubernioj, kaj la registaro ordonis, ke tiuj legomoj ne iru en la merkaton. Ĝi ja konstatas, ke aliaj legomoj estas sekuraj, sed homoj ne volas aĉeti produktojn el tiuj gubernioj. Pro tio terkulturistoj havas grandan malfacilon sen enspezo. Kaj nun fiŝistoj ek suferis pro malpurigo de la maro.

### **Mortintoj, malaperintoj kaj rifuĝintoj.**

La nombro de la mortoj kaj malaperoj superas 30 mil, kaj la nombro de rifuĝintoj estas 180 mil. Tiuj rifuĝintoj loĝas en lernejoj kaj similaj konstruaĵoj, kaj ricevas manĝaĵojn kaj aliajn necesajn donacitajn de homoj en aliaj regionaj kaj de la registaro. Oni komencis la konstruadon de provizoraj domoj, sed bezonos longan tempon por provizi ĉiujn. Kaj same serioze estas kiel vivteni suferantojn, kiuj perdis siajn familianojn, sian domon, sian laborejon kaj sian esperon.

### **Influo al diversaj kampoj.**

La katastrofo atakis ne nur unu urbon aŭ unu gubernion, sed multajn urbojn kaj multajn guberniojn, kiuj ludis gravan rolon en agrikulturo, fiŝado, fabrikado ktp, kaj kies produktaĵoj iris en la tutan japanion, kaj eĉ al la tuta mondo, do la influo de tiu tertremo estas tre granda.

Feliĉe neniu esperantisto en tiu regiono vundigis, nek mortis, sed certe iliaj familianoj kaj parencoj suferas. Dum tiuj tagoj venis multaj kondolencoj kaj kuraĝigoj el la tuta esperantistaro en la mondo. Ni estas estas multe kuraĝigitaj. Eble estas malmulte da malbona influo al la japana Esperanto-movado, sed mi estas certa, ke ni revigligos nin mem kaj la movadon, kaj partoprenos en la tutmonda movado pli energie ol antaŭe.

Hori Javuo  
(el Esperanto (UEA) n.ro 5 \ 2011)

## EL NIA JAPANA KORESPONDANTINO

*En Japanio ni havas plurajn gekonatulojn kaj pro la terura tertremo ni timis pri ili. S.ino Hisako Sano la 23an de marto sendis ĉi raporteton.*

Karaj geamikoj,

Ni, japanaj Esperantistoj, kore dankas vin, alilandajn samideanojn, pro viaj amikaj zorgoj pri la damaĝoj. Verŝajne, vi zorgas pri la vivstatoj de samideanoj en la damaĝitaj regionoj. Ankaŭ mi zorgadis pri ili, kaj



kordeziris, ke neniu pereu pro la katastrofo ĝis nun. Kaj nur nun mi trovis la oficialan informon de la prezidanto de JEI (Japana Esperanto-Instituto). Laŭ ĝi, entute 47 samideanoj estas sekuraj. Tio estas trankviliga sciigo, sed tamen restas maltrankviliga kaj zorgenda afero: unu samideano estas ankoraŭ ne kontaktebla. Oni tamen konjektas, ke li vivas ie, ĉar lia loĝejo estas sur monteto, kien cunamo tutcerte ne venis. Tion mi tutkore deziras. Nun ĉi tie nin minacas radioaktiveco el la atomcentralo. La loĝantoj en la danĝera parto rifuĝis en sekuraj lokoj. Ĉi tie, for de la atom-centralo proksimume 400 kilometrojn sudokcidenta, laŭ la oficiala raporto, la kvanto de radioaktiveco estas tiom malalta, ke ĝi ne influas nian sanon. Eble pro tio la loĝantoj en Tokio kaj nia gubernio Kanagawa relative racie vivas.

Por ŝpari elektron en orienta parto de Japanio oni programis du-tri horan kurentan interrompon en tago.

Oni akceptas tion sen plendo. Nur malprudentaj homoj avide aĉetas manĝaĵojn kaj bateriojn.

Ekde la akcidento vivriskuloj sindone akvumas en la reaktorojn por malvarmigi, kaj penas estingi la akcidenton. Ni forte deziras, ke la defio sukcesu plej baldaŭ, kaj samtempe ili estu sekuraj kontraŭ radioaktivecoj.

Mi deziras, ke mi baldaŭ povu sendi al vi iom pli bonan novaĵon.

Sincere, Hisako Sano

**Informoj pri nukleaj instalaĵoj:** *En Italio, la 12an de junio, oni voĉdonos referendumon kontraŭ la nuklea energio.*

*En Germanio, la registaro decidis la redukon de atom-centralojn antaŭ la jaro 2020.*

## INVITO AL GREZILJONO

Saluton,

Probable vi jam aŭdis pri la kampanjo "esperanto ĉe abituro": [esperanto-au-bac.fr](http://esperanto-au-bac.fr), kaj eble vi mem jam subskribis la peticion. Estas taŭga momento por reproviti tion, kion ni ne sukcesis dum pli ol cent jaroj, sed tio ĉi eniru pli vastan kuntekston: Esperanto en la oficiala instruado. Difinante novajn lingvo-ekzamenojn konformajn al Komuna Eŭropa Referenckadro, nun oficiala en multaj landoj, interalie Francio, Hungaroj sukcesis doni al Esperanto-diplomoj saman valoron kiel alilingvaj diplomoj. En Francio, oni sendube plibonigis sian strategion surbaze de nova analizo de la kunteksto, tamen ne necesas atendi novajn leĝojn por enkonduki Esperanton en diversnivelajn lernejojn.

Ĉio ĉi konsistigos la temon de seminario, "Esperanto en oficiala instruado", organizata en kastelo Greziljono

inter la 17a kaj la 23a de julio 2011. Michel Dechy, Cyrille Hurstel, François Lo Jacomo kaj Guy Camy prezentos kvar aspektojn de tiu ĉi problemaro por vekti konstruan diskuton. Kiel Kulturdomo de Esperanto, la kastelo Greziljono ([gresillon.org](http://gresillon.org)) estas ideala loko por trakti punktojn tiel gravajn por la Esperanto-kulturo. Sed ĝi krome estas, tradicie, ejo por kursoj, ekzamenoj kaj aliaj aktivaĵoj: dum la sama periodo, vi povos sekvi konversaciajn aŭ gramatikajn kursojn de Jean-Luc Kristos kaj Thierry Saladin, trapasi du unuajn gradojn de FEI-ekzamenoj, lerni jogon, kanti kaj aŭskulti kantadon, ĉeesti prelegojn pri diversaj temoj... Ne hezitu viziti nian retejon: [gresillon.org/somero](http://gresillon.org/somero) por trovi pli da detaloj pri nia programo, aŭ rekte por aliĝi al la dezirata periodo: restas ankoraŭ kelkaj liberaj lokoj.



Ĝis tre baldaŭ en nia kastelo, kiu ĉijare festos sesdekjarigan jubileon! Amike, François Lo Jacomo.  
72 quai de la Loire 75019 Paris 0680885327

*Petu informojn pri la kastelo de Greziljono skribante al:*  
[bertox@free.fr](mailto:bertox@free.fr) aŭ

[Gresillon-informas+unsubscribe@googlegroups.com](mailto:Gresillon-informas+unsubscribe@googlegroups.com)

## IKUE KONGRESAS EN ZAGREBO

En la kroata ĉefurbo okazos de la 16<sup>a</sup> ĝis la 22<sup>a</sup> de julio la kongreso de Internacia Katolika Esperantista (IKUE). Kvankam ĝi estas deducita al temoj pri religiaj kaj de la katolika E-movado, ĝi volonte malfermas siajn pordojn al ĉiuj, kiuj deziras ekkoni kaj sperti, laŭ spirito de reciproka komprenemo kaj respekto, sen devigaj reguloj, la agadon de IKUE kiu efektiviĝas jam nun de 101 jaroj.

La kongresejo estas prestiĝa: ĝi estos la granda ĉefepiskopa seminario, kiu staras tute apud la katedralo de Zagrebo, en la urbocentro. Je dispono estas plejparte unullitaj ĉambroj, ĉiuj kun banĉambro.

La partoprenkosto estas aparte favora: de 220 ĝis 325 eŭroj, kiu inkluzivas loĝadon, manĝojn, ekskursojn (la kosto dependas de devenlando kaj elektita ĉambro). Aldoniĝas aligkoto.

Pliaj informoj: [www.ikue.org/kong2011/index.htm](http://www.ikue.org/kong2011/index.htm)

## DEZIRAS KORESPONDI

Mia nomo estas Guillermo Bes Salazar, kubano kaj loĝas en la urbo Santiago de Cuba. Mi havas 31 jarojn kaj profesie mi estas agronomo.

Mi esperantiĝis antaŭ 6 jaroj kaj instruas Esperanton ĉi tie. Esperanton mi multe ŝatas ĉar ĝi estas fortega lingvo por homa disvolviĝo, ĝi estas ŝlosilo por lingva demokratio, ĝi kunigas la homojn kaj la popolojn.

Profesie mi estas agronomo kaj laboras ĉe la Centro pri sanigado de plantoj, ĉi tie mi estas specialisto pri nematodoj (vermoj loĝantaj ene de la grundoj kiuj malsanigas plantojn).

Geamikoj, mi ŝatus korespondi kaj ricevi la Jarlibron de UEA 2010 en PDF-dokumento, ĉu iu povus sendi ĝin al mi rete? Antaŭdankon pro via atento kaj helpo.

Nu karaj, fartu bonege kaj salutojn al ĉiuj

*Guillermo Bes Salazar* [[nematologia@sanveg.co.cu](mailto:nematologia@sanveg.co.cu)]

### ATTIVITÀ SVOLTA

Nei mesi scorsi gli incontri in sede si sono svolti regolarmente come programmati con diverse tematiche.

Il 19 marzo si è tenuta l'Assemblea Generale Ordinaria del Gruppo.

La partecipazione è stata modesta.

L'anno prossimo ci sarà il rinnovo delle cariche sociali e sarà necessaria una presenza più massiccia di Soci.

Sia per votare che per essere votati: infatti c'è bisogno di almeno 12 nomi, ma è meglio se ce ne sono di più.

Che cosa è saltato fuori dall'Assemblea?

Due cose soprattutto:

C'è un bel programma di lavoro, ma c'è bisogno di persone che si impegnino. Se il Gruppo è gruppo, non può affidarsi alle spalle di pochi individui. Si chiede che tutti i Soci diano quel po' di collaborazione che possono dare: dobbiamo preparare la festa del Centenario!

C'è poi un bilancio che soffre per i costi che si devono sostenere, prima di tutto le pesanti spese condominiali. Cosa si può fare? Chi vuole dare un contributo alla casa del Gruppo, lo faccia e sia generoso.

Ognuno poi può dare una mano alla FEI dedicandole il 5 per mille nella propria dichiarazione dei redditi; da lì arriveranno aiuti anche al Gruppo per l'attività informativa. E c'è davanti la festa del Centenario.

Allora avanti insieme e buon lavoro a tutti, ma proprio a tutti!

Il Presidente

### ESPERANTO PROPEDEUTICO

Venerdì 15 aprile siamo stati ospiti del Centro Sociale "2 Agosto 1980" (via Turati 98) con un incontro pubblico sul tema "L'Esperanto come motore: propedeutica all'apprendimento delle lingue, gioco euristico e palestra mentale".

Daniele Agostini, nostro presidente, ha intrattenuto i presenti sulla grammatica esperantista per dimostrarne la facilità di utilizzo propedeutico anche per l'apprendimento di altre lingue.

### AL GEB IN ESTATE

Gli incontri in sede proseguono nel mese di giugno soltanto al sabato pomeriggio senza programma specifico sino al 2 Luglio.

Successivamente il Gruppo chiuderà per ferie e congressi: a Copenhagen per il Congresso Universale (23-30 luglio), a Torino per quello Nazionale (20-27 agosto).

L'attività ricomincerà sabato 3 settembre: ci ritroveremo per raccontarci delle partecipazioni ai congressi e agli avvenimenti esperantisti e, naturalmente, dei soggiorni di vacanza che ci auguriamo saranno stati ottimi per tutti i soci e amici del Gruppo Tellini.

Il 2 ottobre saremo presenti anche quest'anno alla festa di "Volontassiate" che si svolgerà nei viali dei Giardini Margherita, con un gazebo. Invitiamo sin d'ora i soci a collaborare con la loro presenza allo spazio espositivo del GEB.

### LUTTO

Il 25 marzo ci ha lasciati Lidia Testoni.

Non era iscritta al Gruppo, ma era un'amica preziosa.

Era bisnipote di Achille Tellini, e da molti anni curava con passione la memoria del bisnonno.

Lascia i figli Viola e Mattia, ai quali siamo vicini in questa dolorosa circostanza.

La Signora Lidia ci colpiva per la sua vivacità, nel cercare le tracce del nostro Fondatore in istituzioni lontanissime, nello scovare documenti dell'impegno di lui in ogni ambito di studio.

In queste ricerche esplorava anche la biblioteca del Gruppo, mettendo in luce documenti di grande interesse. Cercava di ricostruire i lavori che Achille Tellini pubblicava nella forma di fascicoli monografici, taluni stampati, altri manoscritti, nella collana editoriale *Esperanta Abeló*.

Nel 2009 aveva allestito una mostra su Achille Tellini e i cento anni dell'Esperanto a Bologna, e anche in quell'occasione il Gruppo collaborò fornendo materiale.



Nella foto, Lidia Testoni durante l'apertura della mostra.

Poche settimane prima della scomparsa della Signora Lidia, era morto il cugino Achille Tellini, nipote del Nostro, al quale lei aveva fornito assistenza durante una lunga malattia, e questa perdita l'aveva certamente provata.

Ci ha colpito la vastità dell'apprezzamento, dell'affetto e della stima manifestata nei confronti di Lidia da ogni persona con cui l'abbiamo ricordata, nell'ambiente esperantista come in Regione, dove lavorava, o là dove portava aiuto e conforto col suo impegno volontario.

Noi ricordiamo con rimpianto Lidia Testoni e speriamo che il suo lavoro, che era il recupero del lavoro del bisnonno Achille, possa essere conservato e completato come preziosa eredità della famiglia e della comunità.

Daniele Agostini

Nel numero di marzo/aprile 2011 della rivista L'esperanto della Fei è stata pubblicata la prima parte della ricerca di Lidia Testoni sulla biografia di Achille Tellini.

## ANTONIO PAOLET: 50° DELLA SCOMPARSA

Il giorno 30 aprile 2011, a San Vito al Tagliamento, è stato commemorato il 50° anniversario della scomparsa di Antonio Paolet con una Messa in Esperanto celebrata da don Nello Marcuzzi nella Cappella dell'Annunziata con la partecipazione di esperantisti provenienti anche da Chions e Azzano Decimo. Alla manifestazione erano anche presenti la signora Flavia Paulet e la signora Regina Cantoni accompagnata dal figlio Paolo, moglie di Antonio Paulet, nipoti del cavaliere, l'assessore Gennaro Di Bisceglie e l'ex assessore Antonio Di Bisceglie.

Un ringraziamento è doveroso alla dott.ssa Roberta Garlatti, Direttrice della Biblioteca Comunale di San Vito al Tagliamento, che ha dato la sua disponibilità per ricordare un personaggio che ha fatto molto per il Movimento Esperantista e reso noto in tutto il mondo il nome di San Vito al Tagliamento. Una intensa attività era già stata fatta il 29 maggio 2004 in occasione della inaugurazione della via a Lui intitolata; manifestazione organizzata dal gruppo Esperanto Nova Espero Friuli. Dopo la cerimonia religiosa i partecipanti si sono recati alla Biblioteca Comunale dove, nella Sala Lettura, era stata allestita la mostra di libri stampati da Paolet e, successivamente, al Cimitero, per la deposizione di un mazzo di fiori sulla tomba di Paolet, e in via "Antonio Paulet" per la foto ricordo sotto la targa stradale.

Antonio Paolet, originario Paulet (San Vito al Tagliamento 28.3.1880 - ivi 17.12.1960) diede un grandissimo contributo al Movimento Esperantista. Iniziato lo studio dell'Esperanto da autodidatta, il 10 gennaio 1913 iniziò a pubblicare la rivista *L'Esperanto* (a cui ha avuto quale amico ed attivo collaboratore Achille Tellini, n.d.r.), che molto contribuì alla diffusione della lingua e divenne in seguito organo della Federazione Esperantista Italiana.

La sua tipografia – La Tipografica – venne danneggiata nel corso della prima guerra mondiale, ma, alla cessazione del conflitto, Paolet con sacrifici la ricostruì, riprese in pieno le pubblicazioni e continuò a dirigere la Rivista.

Gli anni immediatamente antecedenti il secondo conflitto mondiale furono un periodo di crisi per l'Esperanto. Ciò provocò una stasi nella vendita delle pubblicazioni e Paolet fu costretto a sospendere la sua attività. Scoraggiato, era disposto a cedere tutta la sua produzione libraria alla Federazione e ritirarsi dal mercato. Ma grazie al prof. Corrado Grazzini (Vicepresidente della F.E.I.), che gli

assicurava tutta la sua collaborazione per una rinascita dell'Esperanto, Paolet continuò il suo lavoro.

Antonio Paolet fu il primo editore esperantista in Italia. Egli aveva saputo creare un'attività editoriale che rese noto in tutto il mondo il suo nome e il nome di San Vito al Tagliamento, che può considerarsi la culla dell'Esperanto nel nostro Paese. Curò, tra l'altro, la pubblicazione di materiale didattico e di scritti e opere di autori italiani tradotti in Esperanto, fra i quali figurano: *Historio de Kristo* (Storia di Cristo, 1931) di Giuseppe Papini e *Koro* (Cuore, 1936) di Edmondo De Amicis.



Copiosa fu la sua corrispondenza con esperantisti, che spaziava dall'Europa Occidentale alla Russia, dalle Americhe alla Cina e al Giappone. Da ogni parte gli giunsero lettere e attestati di plauso per l'attività che andava svolgendo. Questo lavoro gli portava via molto tempo prezioso, ma egli riusciva ad accontentare tutti ugualmente.

Per i suoi meriti culturali, nel 1954 fu nominato Cavaliere Ufficiale della Repubblica Italiana. È difficile pensare che Sior Toni (così lo chiamavano a

San Vito), schivo e cortese, fosse un gran personaggio. Così Ettore Fasce, traduttore della Storia di Cristo e del Cuore, con lettera del 20 dicembre 1960, indirizzata alla famiglia Paulet, scrisse per la scomparsa del Cavaliere: "*Homo, patro, esperantisto kaj samideano tiom amema, aktiva kaj altmerita, kiom silentema kaj modesta*" (Uomo, padre, esperantista e samideano tanto affettuoso, attivo e di alto merito, quanto silenzioso e modesto).

Nell'articolo "Ricordo di un "Maestro" Antonio Paulet", apparso sul Gazzettino di mercoledì 4 gennaio

1961, a pag. 4, si legge: "Ottant'anni egli visse senza che nessuno, tranne gli eruditi, si accorgesse di lui. Fece dell'umiltà laboriosa e costruttiva suo costume di vita, attingendo movente e forza dai valori e dalle virtù della Fede, sublimati nella perfettibilità del Francescanesimo. Passò nella vita schivo di ogni risonanza, tutto preso dal suo lavoro e dai suoi ideali. Gli stessi conterranei, ricordandolo, lo rivedono come l'uomo probo e retto, di squisito sentimento, quasi timoroso di far disturbo al prossimo camminando...". Il lavoro del cav. Paolet fu continuato dal figlio Adelio, che ha provveduto alla ristampa di alcune opere. Nella lettera datata 6 aprile 1961, indirizzata ad Adelio Paulet, il prof. Grazzini scrive: "... e il ricordo e l'omaggio più bello e più degno è la continuazione che Lei con appassionata affettuosità filiale sta facendo dell'opera di Lui."

(Notizie tratte da: "*Il Movimento Esperantista in Friuli*" di Giacomo Martinez, Dopolavoro Ferroviario, Nova Espero Friuli, Udine).

